



Eze (06)

esperanto Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

n° 109 - somero 2017

federacia retejo

www.esperanto-provence.org

nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

baza kotizo por aliĝo

(kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :

"Espéranto-Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la **kasisto**

Nicole Lafitte
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
nlpolecamp@gmail.com

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
p.vilain83@orange.fr

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 30-a de septembro 2017

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

Vorto de la Prezidanto

Finiĝis la studperiodo en niaj asocioj kaj kursejoj kaj nun ni rajtas pensi pri ferioj ! Sed la somero rapide kaj vigle trudis sin kaj ĉiujn surprizis per siaj varmegaj temperaturoj.

Feliĉe, la ĵus ekinta sezono ebligas al ni malstreĉiĝi, renkonti samideanojn, aŭ tute simple ripozi, kiel ni kapablas tiel bone fari en nia bela Provenco. Agrablegan someron al ĉiuj !

Pierre Oliva

Federacia agado

Ekzamenoj de Esperanto

Dum la nacia asocio provas enkonduki Esperanton en mezgradajn* kaj superajn* lernejojn, kun ŝajne pli bona akcepto far la Ministerio pri Edukado, ni bezonas kompetentajn homojn por instrui la internacian lingvon, ne nur lingve kompetentajn sed ankaŭ pedagogie.

Espéranto-Provence instigas la lernantojn el la diversaj urboj trapasi la ekzamenojn de Franca Esperanto-Instituto sed ĉijare, bedaŭrinde, kandidatoj venis nur el la Marsejla regiono. Tri trapasis kaj sukcesis la dua-gradan ekzamenon, la 21-an de majo.

Dankojn al *Thierry Spanjaard*, kiu disponigis sian oficejon por tiu dimanĉa sesio, al *Patrick Lagrange* kaj *Renée Triolle*, membroj de la ĵurio.

Ni memorigas, ke la ekzamenoj estas senpagaj por membroj de la federacio. La skriba parto de la triagrada, la komuna trunko de Kapableco, okazos en Parizo la 14-an kaj 15-an de oktobro 2017.

Bonvole kuraĝu aliĝi !



* : mezgrada lernejo, aŭ mezlernejo = *collège*

* : supera lernejo, aŭ superlernejo = *lycée*

Atentu, ke por ni, esperantistoj, "la nomoj de la lernejsistemoj devas esti vaste kompreneblaj kaj ili ne ligiĝu kun iu ekzistanta landa sistemo". (laŭ ILEI-dokumento)

Por scii pli pri tio, vidu je la paĝo 11 de ĉi tiu gazeto kaj krome legu kaj eĉ elŝutu la sekvan PDF-on :

http://www.ilei.info/novajxoj/rezulto_de_laboro2014.pdf

El la regionaj asocioj



04 - E.K.E.M. Esperanta Kulturo en Manosque

Du 2 au 30 juin 2017, la "Passerelle", médiathèque de Sainte-Tulle (04), nous a hébergés dans ses locaux grâce à sa responsable Marina Meier.



Deux points forts dans cette exposition : le 2 juin, ouverture suivie par la conférence de Monique Arnaud sur le thème "l'étude des langues", en faisant référence à l'excellent livre de Greta Franclét : "Nul en langues, plus jamais !"

Monique A. devant un public peu nombreux mais attentif et varié.



C'est ainsi que nous apprîmes que la langue la plus difficile à apprendre est... ? Eh bien ?... Ne cherchez pas ! C'est la première ! (ndlr : l'anglais ?)

Et à la fin nous avons abordé le sujet : "et pourquoi pas l'espéranto ?"



Le deuxième conférencier fut Patrick Lagrange qui, le 16 juin, nous parla de l'histoire et du fonctionnement de l'espéranto.

raportis José Grammatico



05 - Espéranto-Gap

Monique Arnaud, nelacigebla ambasadoro de nia lingvo...

CULTURE | Au Petit saloon mardi soir **L'esperanto, un langage universel**

Le Petit saloon a accueilli mardi soir une conférence de présentation sur "l'esperanto". Créée en 1887 par Ludwik Lejzer Zamenhof, "l'esperanto" a été inventé pour permettre une communication entre les personnes de langue maternelle différente.

« Le souhait du fondateur était d'en faire une langue universelle, indépendante de tout pouvoir politique ou économique, de tout intérêt particulier » a expliqué Monique Arnaud, la conférencière. Fondée sur une grammaire régulière sans exception et des mots formés à partir d'un nombre limité de racines lexicales et d'affixes,



Monique Arnaud animait cette conférence mardi soir au Petit saloon.

cette langue présente des facilités d'apprentissage pour ses locuteurs. Plusieurs millions de personnes la pratiquent à travers le monde.

LA MURE |

L'esperanto et la Matheysine : des liens méconnus

artikolo en Le Dauphiné Libéré - 13/04/2017

"Léon Caillet était professeur d'histoire et de géographie au lycée de La Mure de 1920 à 1930 et s'il a fondé le syndicat d'initiative de cette ville, il lui revient aussi d'avoir fondé le premier club d'esperanto, la langue internationale.

Représentante de la Ligue Internationale des Enseignants d'esperanto auprès de l'*United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization* (Unesco), en tant qu'observateur, la matheysine Monique Arnaud a commencé sa carrière professionnelle d'enseignante à l'école Sainte-Thérèse sur le mur de laquelle, ironie de l'histoire, a été apposée une plaque «Place Léon Caillet». L'esperanto a été inventé par le docteur Ludwik Lejzer Zamenhof, médecin ophtalmologiste polonais, mort le 14 avril 1917 à Varsovie.

Une langue simple et universelle

Né dans une famille juive, les langues d'usage de

artikolo en Le Dauphiné Libéré - 8/04/2017

pri prelego, kiu okazis la 4-an de aprilo

Zamenhof sont le yiddish, le russe et le polonais. Il est connu pour avoir élaboré la langue construite espéranto dans son ouvrage Langue Internationale, 26 juillet 1887, sous le pseudonyme Doktor Esperanto (« le docteur qui espère »).

L'espéranto est la synthèse géniale de grandes langues de culture, élaborée pour permettre la communication entre les peuples de pays et de cultures différents. Contrairement aux langues nationales il permet aux personnes ayant choisi d'apprendre cette langue de communiquer sur un pied d'égalité. Il est parlé par plusieurs millions de personnes dans le monde."

Bernard Leterrier (*Le Dauphiné Libéré*)



Monika A.
apud la nomplato
"Place Louis Caillet"



13 - Espéranto - La Ciotat

Festivalo de Dividita Poezio

En *La Ciotat*, la asocio *Zygo* ne atendis la modon de divido por diskonigi poezion al ĉiuj. Tiu festivalo venigas junajn poetojn, kiuj promenas surstrate kaj deklamas ; la poetoj ankaŭ vizitas mezlernejojn por klarigi la proceson de inspiro aŭ verkmaniero aŭ renkontiĝas por prijuĝi konkurson "*Les Ciotadines*".

Espéranto-La Ciotat partoprenis la vesperon pri poezio en diversaj lingvoj.

Ĝi okazis la 1-an de aprilo kaj *Renée Triolle* legis originalan poeziaĵon de la brazilano *Sylla Chaves*, "Nomademo", pri la rolo de poeto, kaj poeziaĵon tradukitan de la korea *Kim Sowol*, "Vokado de l'anim".

Ĉiam bona okazo aŭdigi la internacian lingvon al alitipa publiko, kiu aprezas la sonan fluidecon de la lingvo kaj ĝian adaptiĝon al poeziema animo, ekz. :

" sekvi post pluganta revo" aŭ " Voksono jen iras en preter' / tro vastas de l' ĉiel' al ter' ".

" Mi bedaŭras, ke mi mem ne estas poeto, mi certe pli bone tradukus ", lamentas *Renée Triolle*. Interese estas, ke loka poeto, *André Orsini*, kiu estis vizitinta la vesperon pri gepatra lingvo, verkis ĉi-teme kaj deklamis sian lastan verkon, kiu titoliĝas "*Langue maternelle*" !



unu el la tekstoj legitaj de Renée T.

Nomademo, de *Sylla Chaves*

(originale aperis en *Nica Literatura Revuo**
1/5 - majo-junio 1956)

Kial vi, malsaĝuleto,
En la mondon ĵetas vin ?
Surde al la hejma peto,
ĉion lasas vi, poeto,
Por tramondi sen destin'...

Kiu volo, kiu devo,
Kiu celo movas vin ?



* pri "*Nica Literatura Revuo*" (NLR)

Ĝi estis grava kultura kaj literatura periodaĵo en Esperanto aperinta ĉiun duan monaton inter 1955 kaj 1962 en *Choisy-le-Roi*. Entute aperis 42 numeroj kun sume 1680 malgrandformataj paĝoj en redakto de *Gaston Waringhien*.

NLR celis daŭrigi la tradicion de la periodaĵo "*Literatura Mondo*", malaperinta en 1949, kaj kolektis ĉirkaŭ si la plej gravajn aŭtorojn de la frua postmilita epoko. Ĝiaj precipaj temoj estis : poemoj kaj prozo originale verkitaj en Esperanto, poemoj kaj prozo tradukitaj, recenzoj, prilingvaj kaj priliteraturaj artikoloj.

(fonto : *Wikipedia*)

La preskaŭ kompleta kolekto (mankas ja la lasta numero) estas legebla ĉi tie :

<http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/>

Printempo de la lernejoj

De la 5-a ĝis la 7-a de aprilo okazis en *La Ciotat* salono "Edukado kaj teritorioj", kiu kunigis ĉiujn, kiuj kontribuas al edukado de infano, ne nur instruistoj kaj gepatroj sed ankaŭ bonvolemluloj, asocioj, eĉ komercistoj !

De pluraj jaroj *Espéranto-La Ciotat* petas havi budon, kvankam la salono valorigas nur tiun parton, kiu koncernas la urbon : do infanlernejo kaj baza lernejo.



Renée T.
deĵoras
ĉe la Eo-budo

Multis paperfloroj aŭ papilioj faritaj de infanoj, atelieroj por pentri maskojn, bicikloj aŭ ludi, do Esperanto interesas ne la infanojn (inter 3-kaj-6-jarajn) sed la gepatrojn aŭ akompanantojn. Bonaj kontaktoj estis faritaj kun gepatroj aŭ respondeculoj de asocioj por gepatuloj aŭ junaj plenkreskuloj.

Eŭropa Festo

Sabate la 13-an de majo, asocio *EC-Culture* organizis Feston de Eŭropo en la nova urba parko de *La Ciotat*. Diversaj budoj, muzikaĵoj, prelegetoj.

Multaj nekompetentaj junuloj provis organizi sed tute ne kutimas. Tamen, rilate Esperanton kaj lingvojn, estis pli ol ni povis imagi :

- budo Esperanto kun vizitantoj, junaj ĉefe (ni). Neni estis libera kunhelpi, nur fine venis *Michel Eliard* por la malmuntado.

pri ĉiuj okazintaĵoj en La Ciotat raportis Renée Triolle



13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Prelego de Chuck Smith

Marseille-Espéranto
akceptis
la 30-an de marto
en "Domo de Asocioj"
usonan entrepreniston,
Chuck Smith,
fluginte inter Tuluzo
kaj Berlino.



Pro la vento, ne eblis prezenti kartludojn (ĉio forflugis). Celis ĉefe pri konsciigo pri la politika diskriminacia lingvo-problemo, apenaŭ pri la konsisto de Esperanto.

- budo Ruĝa Kruco, nia najbaro, kun konkurso : eltirvorton en rilato kun la laboro de la Ruĝa Kruco, diveni en kiu lingvo kaj eki deklamadon de poeziaĵo (*Frédéric Ganga* el *le Grand Portique* kun kiu ni kutimas organizi prelegojn de prelegvojaĝantoj) aŭ kanton en rilato kun tiu ideo.

- budo pri la kvar alfabetoj en Eŭropa Unio (konata de mi poeto !)

- kantado de la Eŭropa Himno kun kelkaj linioj en Esperanto far 180 ĥoristoj.

- prelegeto (duonhora) pri "Kiu(j) lingvo(j) en Eŭropo" : mi, kun muzika fono ĉar la orkestro kaj la kantistoj prepariĝis por la posta spektaklo, meze de herbejo en plena vento, tamen kun mikrofono. Malgraŭ la malbonaj kondiĉoj, plenplena "salono" (30-35 homoj), ĉefe junuloj el la Eŭropa Asocio ; tre interesitaj, venis por gratuli ĉar ili multon malkovris.

- radioelsendo (zorge preparita de 15-jaruloj, laŭ iniciato de animantino, kiun mi bone konas) pri komunikado, kun unu intervenanto pri Esperanto.

Do, sukcesa tago, ni vidos kiaj estos la reagoj de tiu Eŭropa asocio.

**Fête
de
l'Europe**
Cultivons la diversité !

Chuck, Usonano loĝanta nun en Berlino, esperantistiĝis en 2001 kaj jam samjare iniciatis Vikipedion, la Esperantan version de *Wikipédia*.

De 2015, li kontribuas al la kurso de Esperanto ĉe *Duolingo* (pormomente nur por anglalingvanoj).

Nun, li estras novan aplikaĵon por klertelefonoj : Amikumu.

Kio estas Amikumu ?

Ĝi estas plursistema aplikaĵo por klertelefonoj (*iOS* kaj *Android*), kiu ebligas al esperantistoj trovi samlingv-

anojn en la proksimeco, reduktita al 100 m por eviti spionadon de la homoj. Ĝi same ebligas al alilingvanoj trovi proksimajn esperantistojn per listo aŭ per mapo. La aplikaĵo lanĉiĝis por esperantistoj je la 22-a de aprilo 2017.

La teamo konsistas el 6 homoj, en Berlino, Aŭstralio, Rusio kaj Usono. La ideo estas havi 20 000 uzantojn kaj evidente ne mankas al la gvidteamo ideojn por plibonigi kaj kompletigi la sistemon (mapo, pliaj lingvoj, ktp.)



fontoj : *Vikipedio, Espéranto-France kaj raporto de Renée Triolle.*

Dankojn al Thierry Spanjaard, kiu brile zorgis pri samtempa tradukado de la parolado de Chuck.



Amikumu

Nova Kastelo la Ruĝa, *Terre d'Espéranto*

Laŭ iniciato de *Espéranto-Marseille*, sub la aŭspicioj de la Federacio *Espéranto-Provence*, *Châteauneuf-le-Rouge* (13) iĝis eta Esperantujo sub la nomo "Nova Kastelo la Ruĝa", dum la tuta dimanĉo 4-an de junio.

Nous sommes arrivés le matin très tôt pour installer les panneaux à l'entrée du village, monter le stand, ainsi que coller toutes les autres affichettes. Il faisait beau. De nombreuses personnes étaient présentes. Et ils furent assez nombreux à vouloir s'informer sur le stand, où chaque passage n'était pas seulement une simple information, mais la plupart du temps une discussion approfondie sur le problème des langues et de la suprématie de l'anglais.



Beaucoup ont été étonnés de la facilité de construction des mots. Pascal a donné un cours particulier et nous avons interprété deux fois « La vie en rose » en espéranto.

Le soir venu, il a fallu tout replier, enlever toutes les affiches et panneaux. Ce fut une belle journée car forts des discussions que nous avons eues, nous sommes repartis avec la satisfaction de se dire que l'espéranto n'est pas une utopie de doux rêveurs.

Rosy Inaudi



La urbaj vojmontriloj kaj nomplatoj estis tradukitaj en Esperanton.

Les personnes du club de la chanson qui ont participé étaient absolument ravies de cette première en espéranto. Elles ont beaucoup aimé la rencontre avec vous tous, et ce joli moment qui a permis à certains d'entre-vous de vous joindre au groupe de chant. Pour les chanteurs du club, je pense qu'ils portent désormais un tout autre regard sur l'espéranto. J'espère que nous pourrions entretenir cette dynamique. La signalétique à l'entrée de la ville était Top ! Je crois qu'un certain nombre de contacts ont été établis. Le seul bémol vient des activités prévues en salle puisque la médiathèque était fermée au moment des interventions. (*ndlr : non, en fait, elle était bien ouverte... mais le public n'est pas venu !*) C'était une première, j'espère que tout le monde aura envie de réitérer et de donner de l'élan à cette rencontre.

Jean-Claude Roger

*haltis
kelkaj
promenantoj,
eĉ kandidatoj
al la
deputiteco*



*Jean-Claude R.,
ĥorestro,
kun kantistoj
el Châteauneuf
kaj Gardanne,
akompanataj
de kelkaj
esperantistoj*



Venontaj okazaĵoj en Marsejlo

10 septembro : Vivacité - fête des associations / *29 septembro* : Journée européenne des Langues
1er octobre : Forum des Langues du Monde / pour infos : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>



83 - Espéranto - Le Beausset

Renkontiĝo kun «*Trait d'Union*»



kelkaj el la partoprenintoj en la evento

«*Trait d'union*» estas asocio, kiu ebligas al personoj, kiuj ne konas aŭ ne bone parolas la francan lingvon, lerni ĝin senpage. Do, okaze de tiu renkontiĝo, ni konatiĝis kun multe da eksterlandanoj al kiuj ni povis prezenti Esperanton kaj klarigi plurajn punktojn pri la neceso de internacia kaj justa lingvo.

La urbestro ĉeestis kaj dankegis la bonvolulojn, kiuj instruas en tiu asocio. La renkontiĝo finiĝis per pikniko en tre agrabla etoso.

raportis Pierre Oliva

Venonta evento

"Voyages et espéranto" : ekspozicio de pentraĵoj de *Pierre Oliva*, de la 8-a ĝis la 14-a de septembro, en "*Pôle Saint-Exupéry*" (*Le Beausset*) - inaŭguro vendredon, la 8-an, je la 18-a.



Pique-nique à Correns

Correns (83) : c'est sous les platanes au bord de l'Argens qu'une douzaine d'habitants de ce village écolo ont participé à un cours d'initiation à l'espéranto présenté par Pascal Vilain.

Très bonne initiative d'une espérantiste du village, Paulette Chiarisoli, et de son mari Gérard, qui ont invité le traditionnel pique-nique de fin d'année du groupe de Saint-Raphaël.

Repas partagé, conversations animées et jeux ont suivi .

*raportis Renée T. pour Esperanto-Aktiv' **



subarba kurseto

esperanto
Provence

Correns
Parc de la Roquette

dimanche 11 juin à partir de 11h

Avec le club d'espéranto de Saint-Raphaël
présentation de
l'espéranto – la langue équitable
et mini-cours d'initiation

suivis d'un
pique-nique / auberge espagnole
ouvert à tous



*la tuta grupo ŝategis la dimanĉon
kune pasigitan en Correns !*



* Qu'est-ce que la Lettre d'informations Esperanto-Aktiv' ?

Esperanto Aktiv' est une lettre mensuelle gratuite éditée par les associations Esperanto-Jeunes et Esperanto-France. Elle est destinée à faire connaître les opportunités qu'offre la langue internationale Espéranto.

Pour vous abonner à la lettre **Esperanto Aktiv'**, il vous suffit de visiter la page :

https://fr.groups.yahoo.com/neo/groups/esperanto_aktiv/info puis de cliquer sur le bouton "Rejoindre le groupe".

Les archives des lettres publiées avant décembre 2010 sont accessibles sur le site d'Espéranto-Jeunes, rubrique Lettre d'informations.

Renkontiĝo, je la 2-a de julio, por stampi la finon de la studperiodo

Kiel kutime, ĝi okazis en la restadejo *Val d'Esquière (Les Issambres - 83)*, loko bone konata de la partoprenintoj en la Mediteranea Esperanto-Semajno.

Post komuna manĝado, la 25 ĉeestantoj kuniĝis por ludi, babili, ridi... kaj eĉ danci sub sperta kaj vigla gvidado de *Claudio*, eksa membro de nia klubo.



ĝis la revido en septembro, por la Foiro de la asocioj... kaj plua uzado de nia lingvo...



Prelego en *Romans*

Invititaj de la Eo-asocio de *Romans*, tri el niaj klubanoj, la 18-an de marto, iris al *Valence*. Tie akceptis ilin S-roj *Hannes Larsson* kaj *Duncan Charters*, anglodevena profesoro kaj eminenta esperantisto, kiu instruas en usona universitato. S-ro *Charters* estis faranta prelegturneon en Francio. La temo de lia ĉi-taga prelego estis : "Kial Usonanoj elektis *Trump* ?"

Dum unu horo kaj duono, S-ro *Charters* klarigis la fortajn kaj malfortajn flankojn de ĉiu kandidato kaj ankaŭ la influojn, kiuj kondukis al tiu rezultato.

Trump estis ĉiam komforta en intervjuoj. En debatoj, li amuzis. Multaj homoj ne havis deziron konfesi, ke ili subtenas *Trump* pro timo de atakoj, primokado ĉar ili ne sentis entuziasmon por liaj personaj valoroj kaj dubindaj asertoj.

Hillary Clinton ne estis tre populara ; ŝi ne sciis bone uzi la amaskomunikilojn ; ŝi estis tro dependa de la tradiciaj kampajn-rimedo ; ŝi ne sin montris konvinka defendanto de la virinaj rajtoj ; ŝi ne estis karisma.

En Usono estis ĝenerala deziro pri ŝanĝiĝo. En tiu lando, la religioj havas grandan influon. Evangelianoj, kiuj konsistigas 25 % de la kredantoj, subtenis *Trump*. La elekto de konservativa juĝo ĉe la Ĉefkortumo estis bona por li.

raportoj eltiritaj el la maja numero (76) de "Avignon-Espéranto"

Federacianoj de *Espéranto-Provence* en Esperantio

Nicole Lafitte kaj *Pierre Oliva* en Kvinpetalo (*Bouresse*) por pedagogia seminario

Katalin Kovats gvidis la seminarion de la 10-a ĝis 14-a de aprilo. Temo : «pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj».

Kiel kutime, *Katalin* ne nur disponigis al ni multe da instruiloj, sed ankaŭ klarigis kiel uzi ilin.

Ŝi instruis al ni, per skeĉoj, kiel malkovrigi nian lingvon lude kaj ne instrue. Tiaj ekzercoj estis tre malfacilaj por la 14 partoprenantoj.

Tamen, kelkaj el ni jam spertis pri tio, precipe instruitino en baza lernejo kiu, danke al subteno de sia lernejestro, sukcesis enkonduki Esperanton en sian klason.

Plejparto de la partoprenantoj opiniis, ke problemo kuŝas en la fakto, ke nia rolo riskas reduktiĝi al tiu de nura vartisto.

Eĉ se por ni estas malfacile bone kompreni, kial, kiel, Usonanoj povis elekti tian homon... post tiu prelego, ŝajnas al mi, ke se oni ne estas optimistaj, almenaŭ ni povas esti malpli pesimistaj.

Posttagmeze, S-ro *Charters* denove prelegis pri "Religio kaj religioj en Usono".

Ili estas multnombraj : Protestantoj, Evangelistoj, Metodistoj, Deistoj, Baptistoj, Pentekostistoj, Restaŭristoj, Adventistoj, Atestantoj de Jehovo, Mormonoj, Unitarianoj, Kristsciencanoj, Kvakeroj, Tremkvakeroj, k.t.p. Jen, en Usono, la nuna stato de la ĉefaj religioj : Evangelianoj : 25 % de la kredantoj ; aliaj Protestantoj : 25 % ; Katolikoj : 25 %.

Religio ludas rolon en politiko. Usono rigardas sin kiel "kristanan nacion". Homoj havas suspekton al Romkatolikoj. Evangeliaj kristanoj timas islamanojn. Ili faras premon por malpli da sociaj ŝanĝoj.

Tiu dua prelego bone kompletigis tiun aŭskultitan en la mateno.

Pikniko en *Mallemort*

Ĝi okazis la 25-an de junio. En la programo : matena vizito de la Kastelo de *Lourmarin*, la unua Renesanca kastelo en Provenco, tagmeza pikniko kaj posttagmeza vizito de *Mallemort*.



Ni pasigis bonegan semajnon dank' al la kompetenteco de *Katalin* kaj al la laboro kaj afableco de *Claude Nourmont* kaj *Brian Moon*.

raportis Nicole L. kaj Pierre O.

Renée Triolle kaj Monique Arnaud en Mandres-les-Roses por trankvila, kampareca kaj laborema landa Kongreso de *Espéranto-France*

La moto estis "Maje estu gaje", kaj fakte tiu kongreso en feriejo apud Parizo sed atingebla per aŭtobuso, kiu funkcias nur ĉiun horon, kontrastis kun la pasintjara en Marsejlo. Ne tro da homoj sed familioj kun infanoj, mezaĝuloj aŭ junuloj alportis freŝan venton dum varmaj, sunaj tagoj. Provenco estis reprezentita de *Monique Arnaud*, kiu anstataŭis nian reprezentanton *Pascal Vilain*. Ŝi tre diligente partoprenis la komitat-kunsidojn de *Espéranto-France* kaj *GEE*, kie multe estis diskutata la plano por "*Espéranto au Bac*" kaj elektita nova estraro. Ĉar instruado restas la unua paŝo por ĝui Esperanton, prezentita estis la nova I-kurso de *Espéranto-France*, kiu serĉas novajn korektantojn.

Por festi la centjariĝon de la pariza movado prelegis *Régis Fournier*, sed ĉefe ekspozicion aranĝis *Pascal Hébert* : eblis legi la afiŝitajn dokumentojn aŭ vidi ilin sur granda ekrano en la koridoroj, bona okazo legi la eltondaĵojn de la gazetoj post la morto de *Zamenhof*. Pri lia vivo prelegis *Renée Triolle*, kiu ankaŭ gvidis la ekzamensesion de FEI kaj ĉiĉeronis ekskurson tra la vilaĝo.

La feriejo disponigis sportejon, kie *Michel Dechy*, prezidanto de *GEE* kaj patro de *Nathalie*, gvidis kursojn de teniso. Bonaj rilatoj kun malfermitaj lokuloj donis eks-

pozicion far la infanoj de la baza lernejo, viziton de rozkultivejo kaj eksterprograme, diservon en la vilaĝa preĝejo. Eblis nur ripozi kaj babili, sed la programo proponis diverstemajn prelegojn : Mikaelo *Bronstein* el Rusio pri "*Zamenhof kaj Postnikov*" kaj "La rusa emo ĝardenumi", *Michel Dechy* : "Tinĉjo", *Pierre Dieumegard* : "Eŭropo kaj lingvoj", *Abdel Nouri* : "Parola kompletiga lingvo", *Isabelle Nicolas* (per Skajpo) : "*Célestin Freinet*", sekve tre diverstemaj, kun bildhelpo eĉ se la grandeco de la salonoj ne permesis tre bone legi la ekranojn.

Ankaŭ la vesperoj estis gajaj, kun pianludado de du junaj fratoj *Anh Tuan* kaj *Nam Xuan Clabaut*, koncerto de ĵazo kun *Triple Talk* kun prezentoj en Esperanto de Melono, koncerto de Platano, "hip-hop" kiu krias "fek al Esperanto" sed bele moviĝas sursceneje, sekvita de pensigaj kantoj de *Zhou-Mack Mafuila*, rifuĝinto el Demokrata Respubliko Kongo kiu kantas pacon, militon, malsaton. Pli "ripoziga", almenaŭ por la oreloj, estis la balo kun dancoj laŭ la stilo de danctrinkejo ĉe bordo de rivero.

Pasintjare, ni estis pli videblaj meze de urbo, ĉijare izolitaj en tre agrabla loko : ambaŭ plaĉas al la homoj do eble indos alterni.

raportis Renée Triolle



Alain Rémy... ie en la mondo, por bicikla vojaĝo al Rusio

Kie estas nun nia amiko *Alain* (foto 1) ? Ĉu en Kievo (Ukrainio - foto 2) ? ; ĉu en Moskvo (Rusio - foto 3) ? ; ne, je la dato de la gazeta enpaĝigo, li plu estas en Rusio, sed en Sankt-Peterburgo ; kaj neniu povas scii, kie li estas nun, kiam vi legas ĉi tiun artikolon...

Sur Youtube estas spektebla intervjuo de *Alain Rémy* far *Vladimir Soroka*, en Kievo :

<https://www.youtube.com/watch?v=TC6oOy7SE5U>

1



2



3



Malgajiga novaĵo

La federacio *Espéranto-Provence* kaj la Esperanto-Klubo de *Saint-Raphaël* perdis du el siaj fidelaj membroj. Forpasis **André Loisel**, la 10-an de aprilo, kaj **Marie Bourgeois**, la 20-an de majo. La federacia membraro funebras kaj kondolencas la familianojn.

André Loisel



*André et son épouse Denise,
aux Issambres, le 1er juillet 2012*

Beaucoup d'entre-vous l'ont bien connu et savent avec quelle inlassable ardeur il œuvra pour le bien de l'espéranto, dont il assura la promotion et qu'il enseigna à de nombreux élèves.

Mais peut-être n'avez-vous pas tous conscience de l'ampleur de la tâche accomplie par André, toujours aidé et secondé, d'ailleurs, de son épouse Denise.

Après une carrière de cheminot à la SNCF, un an à peine après avoir commencé à jouir de sa retraite en 1981, André redonna vie au club espérantiste de Saint-Raphaël / Fréjus dont il devint le président.

En 1983, il organisa le Congrès National de l'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto, puis en 1987 celui de l'Union Française pour l'Espéranto,

connue aujourd'hui sous le nom d'Espéranto-France. En 1988, il devint membre du bureau de la Fédération Espéranto-Provence qui lui confia sa présidence en 1989, poste qu'il occupa jusqu'en 1993.

Son action ne se limita pas à ces rôles administratifs puisque André fut aussi enseignant de la langue internationale et rédacteur du bulletin Espéranto-Provence de 1993 à 1995.

Au plan international, il resta durant plus de cinquante ans membre individuel de l'Association mondiale d'Espéranto, l'UEA, dont il fut d'ailleurs l'un des délégués. Cette fidélité lui valut d'être honoré, le 30 juillet 2011, par un diplôme signé par le président de l'association mondiale, remis à l'occasion du Congrès Universel de Copenhague.

*(extrait de l'hommage à André lu par Pascal Vilain
à l'athanée de St-Raphaël)*



Marie Bourgeois

*à Saint-Raphaël,
le 15 décembre 2013,
lors de la "Zamenhof-festo"*


La familianoj de *Rolland Accomiato*, forpasinta en marto, donacis al nia federacio ĉiujn liajn esperantaĵojn (librojn, vortarojn...)

Tiuj certe ege kontentigos samideanojn, ekzemple en Afriko.

Laŭ la deziro de *André Loisel*, monsumo estis kolektita okaze de la funebra ceremonio.

Tiun sumon sendis *Denise* por la federacia kaso ; ĝi pagos ĉiujn kostojn rilatajn al nia gazeto por la nuna jaro.

Korajn dankegojn al ili !



Paĝo de la komencantoj

Chaque pays a un système d'enseignement qui lui est propre. Pour cette raison, il est déconseillé d'utiliser au niveau international une terminologie qui pourrait ne pas être comprise de la même façon par tous. (ex. : école maternelle, élémentaire ou primaire, collège, lycée... enseignant, instituteur, professeur... etc.)

Un groupe de travail de la Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes (*ILEI : Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*), composé de Monique Arnaud et Renée Triolle, de notre fédération, ainsi que de Mireille Grosjean, actuelle présidente d'ILEI, s'est réuni du 2 au 5 juin 2014 pour élaborer le document de travail ci-dessous. A utiliser sans hésitation !

AĜO	NOMO DE LERNEJO	EXZAMENO DIPLOMO	NOMO DE LA DIPLOMITO	NOMO DE LA INSTRUANTO
3 ĝis 6 aŭ 7	Antaŭlernejo	—	—	Prizorganto, Instruisto
6 aŭ 7 ĝis 11 aŭ 12	Baza lernejo	—	—	Instruisto
11 aŭ 12 ĝis 15 aŭ 16	Meza lernejo	D unu	Do-unu-ulo	Instruisto
15 aŭ 16 ĝis 18	Supera lernejo	D du	Do-du-ulo	Instruisto
18 ĝis 21 aŭ 22	Altlernejo	D tri	Do-tri-ulo	Profesoro
22 ĝis 25	Altlernejo	D kvar	Do-kvar-ulo	Profesoro
25 ĝis 27	Altlernejo	D kvin	Do-kvin-ulo	Profesoro

Dans le n° 110 - automne 2017, vous trouverez une autre série de termes relatifs à l'enseignement qu'il est conseillé d'utiliser au niveau international.



Plurelekta demandaro
laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de *Espéranto-Info*



Superzam'
proponita de
Jean-François Cousineau

- En kioma jaro okazis la unua Universala Kongreso ?
a- 1897 b- 1901 c- 1905
- Kiu el la jenaj verkoj de Baghy ne estas romano ?
a- Verdaj Donkiĥotoj b- Viktimoj c- Sur sanga tero
- Kiu akordeonis ĉe la origina Kajto ?
a- Ankie b- Marita c- Marian
- Kio estis la patro de Zamenhof ?
a- instruisto b- notario c- komercisto
- Kiu korelativa finaĵo signas direkton ?
a- a b- al c- en
- Kiu estas la plej longa rivero en Norda Ameriko ?
a- Misisipo b- Misuro c- Sankta-Laŭrenco

1 - gramatika

- a) Li laboris tiel bone la aliaj.
1 - kiel ; 2 - kiu ; 3 - ke
- b) Li atendis tiom da horoj li ekdormis.
1 - kiom ; 2 - ke ; 3 - kiel
- c) Li laboris tiom da horoj necesis.
1 - kiom ; 2 - ke ; 3 - kiel

2 - vorto-trezora

- ĉ) elektu "eksa", "maljuna" aŭ "malnova" por traduki la francan "ancien"
1 - personne :
2 - objet :
3 - qui n'est plus en fonction :
- d) elektu "alvoko", "apelacio" aŭ "voko" por traduki la francan "appel"
1 - pour faire venir :
2 - invitation :
3 - juridique :

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a : 1 ; b : 2 ; 3 : 3

2 - vorto-trezora

ĉ1 : soifigi ; ĉ2 : difekti ; ĉ3 : falsi

d1 : komenci ; d2 : allogi ; d3 : ekfunkciigi

Solvoj de la demandoj
en EP 108
printempo 2017

Superzam'

- 1 c > Varsovio ; 2 c > Pilgrimo
3 c > La velŝipo Magdalena
4 a > 1859 ; 5 a > am
6 a > Amazono (6700 km)



El la mesaĝkesto de la legantaro

Liba Gabalda

Koran dankon pro la sendita gazeto, kiun mi kun intereso tralegis. Mi ŝatas scii pri eventoj en Esperantio kaj en via gazeto mi ĝuste tion trovas. Vi estas tre aktivaj en via regiono kaj tio bonas por Esperanto.

respondo de la red.

Dankon, Liba ! Pere de nia gazeto, viaj laŭdoj iras al la tuta PACA-federacianaro.

Monika Arnaud

Mi bone ricevis la gazeton, rapide trafoliumis ĝin kaj miris pro ĝia bunteco kaj la valoro de la diversaj artikoloj !

respondo de la red.

Dankon, Monika ! La valoron de la artikoloj ŝuldas la gazeto al la kontribuantoj, kutimaj aŭ nur okazaj.

Roselyne Favier

Mi dankas vin pro la sendo de la gazeto kaj gratulas la partoprenintojn en ties redaktado.

Legante ĝin, mi multe lernis pri diversaj aĵoj, kaj ofte mi devis serĉi vortojn en la vortaro.

respondo de la red.

Dankon pro viaj gratuloj, kiuj iras al ĉiuj, kiuj kontribuas al la bona vivo de nia gazeto.

La fakto, ke vi devis serĉi vortojn en vortaro, pruvas, ke neniam lingvo-lernado povas esti komplete finita.

Necesas studi plu kaj plu... Bona novaĵo, ĉu ne ?

Martine Demouy

Dankegon pro la tre interesa gazeto.

respondo de la red.

Nia gazeto estas do legata en la Perigozia (aŭ Perigorda ?) regiono ! Kia famo !

Philippe Combet

Prikantindas, ke mi trovis neniun eraron ! Ĉu vi sukcesis forpeli la koboldojn ? Aŭ ĉu mi estas laca ?

respondo de la red.

Ĉu senkobolda gazeto estas do ebla ? Se veras, tio devigas min - ho ve ! - neniam plu malpli bone fari !

Kaj certe lacis ne vi, Philippe, kiu ja ĉiam olimpie fartas, sed la koboldoj !

Thierry Spanjaard

Dankon pro tiu belega kaj dikega bulteno ! Mi ĉiam ŝategas legi ĝin, kaj mi ĉiam estas impresita de la multnombraj agadoj, grandaj kaj malgrandaj, faritaj de la kluboj en nia regiono. Kompreneble, mi ŝatis legi ankaŭ la du raportojn pri la MES.

respondo de la red.

Estas ĉiam plezure por mi, redaktoro, ricevi mesaĝon de fidela leganto, kiu vere malkovras ĉiujn artikolojn de sia gazeto. Kiel mi jam respondis al Monika, la fakton, ke mi aperigas multajn raportojn pri klubaj agadoj, mi ŝuldas al ĉiuj kontribuantoj, kiuj sendas ilin al mi.



A noter sur votre agenda

dans notre fédération

Forums des associations

septembre 3 - Fréjus (Base Nature)

septembre 10 - Marseille (Vivacité - Parc Borély)

septembre 19 - Manosque (Parc de Drouille)

><><><

septembre 9-10 - Embrun : Foire Bio Génépi

septembre 20-24 - Manosque : Les Correspondances

septembre 29 - Marseille : Journée Européenne des Langues

septembre 30 - Marseille : Forum des Langues

octobre 1 - Marseille : Forum des Langues du Monde

novembre 18-19 - Le Beausset : fin de semaine culturelle

(bulletin d'adhésion dans le n° d'octobre)

2018 - février 24 / mars 3 : Les Issambres :

Mediterranea Esperanto-Semajno

(bulletin d'adhésion dans le n° d'octobre)

en France

Château de Grésillon - Baugé (49)

juillet/août : <http://gresillon.org/somero>

jusqu'à l'automne : <http://gresillon.org/agendo>

août 14-20 - Plouezec (22) : 21^{èmes} rencontres internationales - reyssetplouezec@hotmail.fr

en Europe

août 26 / septembre 2 - Heraclea (Matera - Italie) :

84^{ème} Congrès italien d'espéranto

<http://kongreso.esperanto.it/84/>

ailleurs dans le monde

juillet 22-29 - Séoul (Corée du Sud) : 102^{ème} Congrès mondial d'espéranto

<http://www.uea.org/kongresoj/>

juillet 29 / août 5 - Séoul (Corée du Sud) : 90^{ème} Congrès de SAT - <http://sat90.org/>